

La Prezo de Paco

Prezidanto Marion G. Romney
Unua Konsilanto de la Unua Prezidantaro, Oktobro 1983

Mi elektis la temon "La Prezo de Paco" pro la granda sopiro pri paco en la mondo kaj pro nia malsukceso trovi ĝin.

Bedaŭrinde, en nia serĉado pri paco, ni similas tiujn, al kiuj Paŭlo aludis, "ĉiam lernantaj, kaj neniam kapablaj veni al la scio de la vero." (2 Tim. 3:7) Ni ankaŭ similas tiujn, pri kiuj Jesaja diris, "kiel sonĝo, kiel nokta vizio estos la multo de la popoloj ... kiel malsatanto sonĝas, ke li manĝas, sed li vekiĝas, kaj lia interno estas malplena." (Jesaja 29:7-8.)

Kiam mi estis en la milita servo dum la Unua Mondmilito, oni diris, ke ni bataladis por fari la mondon sekura por demokratio; ni militis militon por estingi ĉiujn militojn. Kiam mia plejaĝa filo estis en la militservo dum la Dua Mondmilito, oni diras al li, ke li gardas la kaŭzon de libereco. La sama rezonado daŭras jam dum la pasintaj pluraj jardekoj.

Kial malsukcesis nia generacio, kun ĉia ĝia prifanfaronata lernado, tiom mizere malsukcesis en ĝia serĉado pri la paco? Mi nur povas respondi, ke ni ne volas pagi ĝian prezon. Tie ĉi mia celo estas ekspliki tian prezon.

Oni plurmaniere difinas pacon, sed eble ni konsideru ĝin kiel "harmonion en oni mem, kaj kun Dio kaj kun la homaro." Tiu ĉi koncepto inkluzivas ĉiujn erojn de iu ajn vortara difino. La malo de paco kaj harmonio, laŭ vortaristoj, karakteriziĝas per konflikto, argumentado, disputado, luktado kaj milito. Ni prikonsideru ĉi tiujn du difinojn de paco kaj ĝian antitezon per la lumo de la Sanktaj Skriboj. Unue, mi atentigu, tamen, ke mi baziĝas sur la Sanktaj Skriboj kredante, kiel mi kredas, ke ili enhavas la malkaŝitajn vortojn de Dio, kaj ke Dio, sciante ĉion, komunikis sian eternan veron.

Nun, al la Sanktaj Skriboj: "La faroj de la karno," diris la Apostolo Paŭlo, estas "malĉasteco ... voluptemo, idolkulto ... malamikeco, malpaco, koleregoj ... envioj, ... ebriceco, murdoj, ... kaj aliaj similaj" (Galatoj 5:19-21). Rimarku, kiom similaj estas la faroj de la karno al konfliktoj, argumentado, luktado kaj milito la antitezo de paco kaj harmonio. "Sed la frukto de la Spirito estas amo, ĝojo, paco, pacienco, komplezo, bonkoreco, fideleco, mildeco, sinregado," (Galatoj 5:22-23) la ĝustaj elementoj de paco, kiujn ni serĉas. Per la ĉi tie cititaj difinoj ĉu ne estas klare, ke tio, kion ni devas fari por gajni pacon estas havigi la frukton de la Spirito? Aŭ, por esprimi ĝin alimaniere, ĉar Lucifero estas la "patro de konflikto" (3 Nifai 11:29), la antitezo de paco, la prezo de paco estas venko super Satano.

Mi scian, ke estas tiuj, en la mondo, kiuj neas la ekziston de iu ajn persona satano. Tia ĉi ne estas falso kaj estas patronita de la patro mem de mensogoj, sed ĝi ne estas nova. La KontraŭKristoj laŭ ties influo, neas la ekziston de Satano ekde antikvaj tempoj. La fakto

estas, tamen, ke Lucifero estas estaĵo de Spirito, same kiel Jesuo kaj vi kaj mi estis estaĵo de spiritoj antaŭ ol ni naskiĝis.

En la Spirita Mondo, Satano estis estaĵo de granda potenco. Jesaja aludis lin kiel la filon de la mateno; "Ho Lucifero, filo de la matenruĝo! Kiel vi falis de la ĉielo, ho brilo! Hakita sur la teron vi estas," li vekriis (Jesaja 14:12). Tamen, Lucifero malakceptis la planon de la Patro por la savo de la homaro kaj strebis anstataŭigi ĝin per sia propra plano.

Malvenkite, li kun triono de la ĉielaj estaĵoj estis "elĵetitaj, kaj li ... fariĝis Satano ... la patro de ĉiuj mensogoj, por trompi kaj blindigi la homojn kaj gvidi ilin kaptite laŭ sia volo." tio estas, tiujn, kiuj ne "Aŭskultos mian voĉon" (Mozeo 4:3-4).

Unu el la trompitoj de Satano, laŭnome Korihor, fariĝinta neparolpova pro ripeta neado de la ekzisto de Dio, "antaŭenstreĉis sian manon kaj skribis ... Mi scias, ke mi estas muta ĉar mi ne povas paroli; kaj mi scias, ke nenio krom la povo de Dio kapablas alporti ĉi tion al mi; jes, kaj mi ĉiam sciis, ke estas Dio. Sed jen, la diablo trompis min; ĉar li aperis al mi en la formo de anĝelo kaj diris al mi: Iru kaj regajnu ĉi tiun popolon, ĉar ili ĉiuj devojiĝantas postsekvante je nekonata dio, kaj li diris al mi: Ne estas Dio; jes, kaj li instruis min pri tio, kion mi diru. Kaj mi instruis liajn vortojn; kaj mi instruis ilin ĉar ili estas plaĉaj al la karna menso; kaj mi instruis ilin, eĉ ĝis kiam mi spertis multe da sukceso; tiom, ke mi vere kredis, ke ili estas veraj; kaj pro ĉi tiu kaŭzo, mi neis la veron, eĉ ĝis kiam mi alportis ĉi tiun malbenon sur min mem" (Alma 30:52-53).

Vi komprenu, ke Korihor sciis, precize dum li neis alian ekziston, ke estas Satano kaj estas Dio. Multe de la modernaj kolegoj de Korihor plenumas la antaŭdiron de Nifai, kiu parolante pri niaj tagoj, diris: "Je tiu tago, li (la diablo) koleriĝos en la koroj de la filoj de la homoj kaj kolerigos ilin kontraŭ tio, kio estas bona. Kaj aliajn li pacigos, kaj li forlulos ilin en karnan sekurecon, kaj ili diros: ĉio bonas en Ciono, jes Ciono prosperas, ĉio bonas kaj tiel la diablo prifriponos iliajn animojn, kaj forĝvidos ilin zorge inferen. Kaj jen, aliajn li forflatos, kaj diros al ili, ke ne ekzistas infero; kaj li diros al ili: Mi ne estas diablo, ĉar tio ne ekzistas kaj tiel li flustros en iliajn orelojn, ĝis li ekprenos ilin per siaj teruraj ĉenoj, el kiuj ne estas liberiĝo." (2 Nifai 28: 20-22). Ne ni estu certaj pri la jeno: se ne estas diablo, ne estas Dio. Sed ekzistas ja Dio kaj ekzistas diablo, kaj la enkonduko de la paco postulas la forigon de satana influo. Kie li estas, paco neniam povas esti. Plue, paca kunekzistado kun li estas neebla. Li ne kapablas esti devigata kunlabori en la subteno de paco kaj harmonio. Li antaŭenigas nenion krom la agoj de la karno. "Ĉio ajn, kio persvadas la homon fari malbonon kaj ne plu kredi je Kristo, kaj malkonfesi lin, kaj ne plu servi Dion, vi povas scii kun perfekta kono, ke ĝi estas de la diablo; ĉar laŭ tiu ĉi agmaniero laboras la diablo, ĉar li persvadas neniun homon fari bonan; ne eĉ unu, nek liaj anĝeloj; nek tiuj, kiuj submetiĝas al li." (Moroni 7: 17). Kiel preludo al paco, la influo de Satano devas esti tute subigita.

Eĉ en la ĉielo, ne povis esti paco kun li post lia ribelo. Tie, en la Spirita Mondo, la Patro kaj la Filo ne povis trovi iun ajn bazon, sur kia ili povus kunlabori kun li. Li devas esti forĵetita ne kunkompromisita, sed forĵetita. "Neniu," diris Jesuo, "povas esti sklavo de du sinjoroj; ĉar

aŭ li malamos unu kaj amos la alian, aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la alian. Vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono!" (Mateo 6:24). La surtera vivo estas stadio de elprovo, por ĉiu persono, de du fortegaj povoj tirante el malsamaj direktoj. Jen la povo de Kristo kaj lia bono. Jen Satano kaj liaj kunvojaĝantoj.

La homaro, per la ekzercado de la libera volo, de Dio donita, devas elekti veturi en kompanio de unu aŭ de la alia. La premio por sekvi la unu estas la frukto de la Spirito paco. La premio por sekvi la alian estas la faroj de la karno la antitezo de paco.

Dum ses jarmiloj, la kampanjon por homanimoj militas Satano per nebremsita furiozeco. La disvastigita diboĉado, idol-kulto, disputado, sangverŝado, suferado kaj malfeliĉo sub kio la loĝantoj de la tero ĝemis tra la jarcentoj atestas la fakton, ke Satano ĉiam manipulis fortan influon.

Spite al tio, ke la agoj de la karno ĝenerale prosperas, estis almenaŭ du periodoj de paco kaj alia estas venonta. La Nifaiidoj, post la vizito de Jesuo al ili, forigis la farojn de la karno kaj ricevis la frukton de la Spirito. Tiel ĉi ili tion faris: "La disĉiploj de Jesuo establis la eklezion de Kristo ... kaj ĉiuj, kiuj alvenis al ili, kaj vere pentis pri siaj pekoj, estis baptitaj en la nomo de Jesuo, kaj tiuj ricevis ankaŭ la Sanktan Spiriton. Kaj ... en la trideksa jaro konvertiĝis ĉiuj loĝantoj, sur la tuta tersurfaco, al la Sinjoro." Sekve de tio, "malestis inter ili interkvereloj kaj disputadoj ... pro la amo de Dio, kiu ĉeestis en la koroj de la popolo. Kaj regis nek envio, nek interkverelo, nek tumulto, nek malĉastaĵoj, nek mensogoj, nek murdoj, nek kiu ajn maniero de voluptemo, ... sed ĉiuj estis inter si kiel unu, la infanoj de Kristo kaj heredantoj de la Regno de Dio kaj ĉiu homo traktis ĝuste al ĉiu alia kaj tutcerte," registras la libro, "ne povis ekzisti pli feliĉa popolo inter ĉiuj popoloj, kiuj estis kreitaj per la mano de Dio. (Vidu 4 Nifai 1-2,15-17).

Tia ĉi stato regis inter ili dum preskaŭ du jarcentoj. Tiam, forlasante la evangelion de Jesuo Kristo, la Nifaiidoj revenis al la faroj de la karno, kaj komencis "ekaperi inter ili iuj, kiuj leviĝis en fiero, ... kaj ili komencis interdividiĝi laŭ socitavoloj kaj komencis malkonfesi la veran eklezion de Kristo.

Estis inter ili ankaŭ iaj eklezioj, kiuj pretendis koni Kriston, kaj malgraŭ ĉio, malkonfesis la plejparton de lia evangelio." Tio estas perfekta prototipo de niaj tempoj. Nu, ĉi tiuj eklezioj "plimultiĝis pro malviro kaj pro la povo de Satano, kiu gajnis iliajn korojn." (4 Nifai 24-28). Tiamaniere sinlasante al Satano, la Nifaia popolo, kiu per rigora obeo al la evangelio de Kristo, ĝuis perfektan pacon dum preskaŭ du jarcentoj, estis, post du jarcentoj plu, tute detruita kiel nacio per civila milito.

Alia popolo, kiu atingis pacon estis la popolo de Ĥano; kiu vivis antaŭ la diluvo. Ili alvenis al la paco per la sama vojo kiel la Nifaiidoj, kaj ili ĝuis la saman feliĉon. Sed, ili ne cedis poste al Satano kaj ne reiras al la agoj de la karno, kiel faris la Nifaiidoj. Male, ili daŭris en sia justeco kaj la "Sinjoro venis kaj loĝis kun ili" kaj li "nomis sian popolon Ciono, ĉar ili estis de unu koro kaj de unu menso, kaj loĝis en justeco. Kaj ili konstruis urbon, kiu estis

nomita la Urba de Sankteco, eĉ Ciono," kiu estis en "la forpaso de la tempo alprenita en la ĉielon," kie nun ĝi estas. (Mozeo 7:16-21)

El ĉiuj posteuloj de Adamo kaj Eva, la popolo de Ĥano; estas la sola, laŭ mia kono, kiu atingis daŭran perfektan pacon. Kiel estis inter la Nifaiidoj kaj la popolo de Ĥano; tiel ĉiam estis kaj ĉiam estos; ĉar la forpelo de Satano per obeo al la evangelio de Kristo estas la prezo de kaj la solvo al paco. Dio, per Sia senfina zorgo pri la bonfarto de Siaj infanoj, montris al ili ĉi tiun vojon al la paco en la komenco de la mondo, kaj li remontris ĝin en ĉiu epoko ek de tiam. Li tiel senĉese avertis pri la katastrofoj, kiuj sekvas la forlason de tiu vojo.

Se unu sola persono cedante al Satano plenumiĝas de la faroj de la karno, li militas en si mem. Se du cedas, ili militas en si mem kaj inter si. Se multe da personoj cedas, la societo pompas je la rikolto de ega subpremo kaj disputado. Se la regantoj de iu lando cedas, ekestas mondskala disputado, ĉar kiel diris la profeto Jesaja "la malpiuloj estas kiel malkvieta maro, kiu ne povas trankviliĝi kaj kies akvo elĵetas ŝlimon kaj koton. Ne ekzistas paco por la malpiuloj, diras mia Dio." (Jesaja 57:20-21)

Same kiel la faroj de la karno estas universale aplikataj, tiel ankaŭ utilas la evangelio de paco. Se unu homo vivas laŭ ĝi, li havas pacon en si mem kaj inter si. Se la civitanoj de iu nacio vivas laŭ ĝi, la nacio havas enlandan pacon. Kiam estas sufiĉe da nacioj spertantaj la frukton de la Spirito por kontroli mondaferojn, tiam kaj nur tiam, pulsos ne plu la militoamburoj militotamburoj, kaj la batalflagoj estos ferlitaj en la Parlamento de la Homaro, la Mondfederacio. (Vidu Alfred Lord Tennyson, "Locksley Hall, The Complete Poetical Ŭorks of Tennyson, ed. Ŭ.J. Rolfe, Boston: Houghton-Mifflin Co., 1898 p.93, linioj 27-28.)

Nu, estas multe da personoj, kiuj penas servi Dion sen ofendi la diablon. Ili vekas en la menskonceptoj de multaj verserĉantoj, la ĉagrenan demandon, ĉu ne estas iu meza punkto, kie la paco povas esti sekurigita estas la sola celo de nia vivmisio. Ni ne trovu ian ajn plezuron en la fakto, ke la strebado de la homaro elmontriĝas senefike. Mi ne kontraŭstaras iliajn penojn. Multe da ili faras, verŝajne, tre multe konsidere de la lumo, kiun ili posedas, por trovi pacon. Tamen, mi ne povas vidi ian ajn ĝustigon por ni, kiuj posedas la klaran lumon de la evangelio malkaŝita de Kristo, pasigi niajn vivojn stumblante tra la nebulo sekvante la necertan flagreton de tremanta kandelo prilumita de la saĝeco de la homoj.

Male, ni dediĉu nian energion al la disvastigado de la vera lumo kaj forigu la nebulon de tiuj, kiuj ne vidas la lumon.

Do, eĉ strebante instrui la evangelion de paco, ni rimarkas, ke la plejmulto da personoj preferas enfokusiĝi en aliajn aspektojn de la problemo. Malgraŭ tio, ni ne vivu senespere kaj malfeliĉe.

Ni ĝuu la vivon en la lumo de rivelita vero. Ni memoru tion kion diris la Sinjoro pri la prezo de paco. Mi estas dankema, ke la tagoj de mi elpruviĝo estas dum ĉi tiu mondepoko, en kiu la lumo de rivelita vero brilas gloro. Mi scias pri neniu alia epoko, dum kiu mi preferas vivi.

Se, en la prudento de Dio, holokaŭstoj alvenos, la tero ne diseriĝos aŭ fariĝos nepriloĝebla. Ĝi estas parto de la ŝoseo de la profetoj al la aŭroro de glora jarmilo de perfekta paco. Ĉar ĉi tion mi scias kaj pri ĝi vi ankaŭ povas certiĝi en la fino, justeco venkos; la potencoj de mallumo estos fortimigitaj; paco venos.

Kiel popolo, ni ĵuru praktiki en niaj personaj vivoj, en niaj hejmoj en niaj negocoj, en ĉiuj niaj interrilatoj kun aliuloj kaj inter ni mem, la principojn de la restaŭrita evangelio de Jesuo Kristo. La frukto de ĝia spirito alportas kaj establas pacon. Kaj ĉiu ni kapablu havi pacon en ni mem, se ni volas pagi la prezon.